



> Ni pontu <

## 'Nova Urbo'

UNUECO TRANS ĈIUJ KULTUROJ

Venos baldaŭ printempo (en norda duonglobo), verdiĝos arboj kaj revenos migrantaj birdoj. Eble aŭdiĝos abeluj-zumado: kelkloke, sed ne ĉie. Silente, je monda skalo formortas miliardoj\* da abeloj. Tio kaŭzas la danĝeron tute interrompi nian manĝo-ĉenon kaj samtempe malstabiligi la tre delikatan ekvilibron de la naturo. Abeloj ne nur produktas mielon – tiu giganta, humila armeo polenadas **75%** de ĉiuj plantejoj kaj agrikulturaj kreskaĵoj.

### Antaŭ ol formortos abeloj

Dum lastaj jaroj oni observis alarmige altan mortindicon de tiuj laboremaj insektoj, kies kelkaj specioj jam ne plu ekzistas. Post energie organizita kampanjo, en Eŭropa Unio oni malpermesis uzadon de la pesticidoj, kiuj mortigas abelojn – amase kaj kun terura rapideco. La problemoj pli komplikas en Usono.



Tie kemiaj konzernoj provas influi la registaron ke ĝi ne enkonduku la rulojn, kiuj malpermesos uzadi pesticidojn. Nur en Kalifornio (la plej riĉa ŝtato de Usono), la abelistoj perdas jare trionon de siaj abeloj. La konzernoj subvencias foje esplor-institutojn por rezultigi atestojn, ke tiun ekologian katastrofon kaŭzas *multaj* faktoroj. Malgraŭ ĉio, independaj sciencistoj pruvas ke la ĉefa kialo estas ja pesticidoj. Por savi abelojn, Internacia organizaĵo "Avaaz"\* publikigis en 18 lingvoj peticion kaj sendis ĝin al Usono por ke oni ĉesu tie aplikadi la mortigajn kemiaĵojn antaŭ ol estos jam tro malfrue. La dokumenton subskribis rete jam pli ol 3 milionoj el ĉiuj kontinentoj. Kiam oni ne plu uzos pesticidojn en Eŭropo ka Usono, tiam pli facile estos atingi tiun celon ankaŭ en aliaj landoj.

Vi povas legi la tutan artikolon (kun la peticio en multaj lingvoj) sur la retpaĝo de Avaaz, same kiel ĉi tiu: [https://secure.avaaz.org/en/save\\_the\\_bees\\_us\\_pet\\_loc/?bTdJOdb&v=47064](https://secure.avaaz.org/en/save_the_bees_us_pet_loc/?bTdJOdb&v=47064). (Cetere, kelkaj esperantistoj provas uzi tiun multnombran organizaĵon por oficialigi Esperanton). Abeloj apartenas al kernaj faktoroj de la vivo sur nia planedo. Se ili formortos, tiam onidire la sama sorto atingos eventuale ankaŭ homojn. Sciencistoj avertas, ke sen abela polenado unu triono de nia manĝo-ĉeno neniam estos akirebla. Rezulte, plimulto de niaj bongustaj fruktoj, legomoj kaj nuksoj malaperos el kuirejoj. Kaj kiel agrikulturo provizu nutraĵon por dombestoj, kiam senpolenaj plantoj ne multobliĝos? Do, sen plantoj mankos ankaŭ viando, lakto, ovoĵ... Tiel aspektas parto de nia manĝo-ĉeno. La organizantoj de ĉi tiu kampanjo apelacias, ke ni ĉiuj kunaktivu kaj ne lasu decidi pri nia estonteco al tiuj politikistoj, kiuj servas por kemiaj konzernoj. Nun estas granda ŝanco haltigi uzadon de pesticidoj internaciskale kaj tiumaniere ni faras gravan paŝon al pli sekura mondo – ne nur por ni, sed same por la bestospecioj, de kiuj ankaŭ ni dependas.

\* Miliardo = 1 000 000 000 (unu + 9 nuloj) aŭ 1000 milionoj -  $10^9$  (matematika potencado: mil obligita trifoje). Ni tion ĉi tie klarigas, ĉar ofte okazas en tradukoj, ke oni laŭvorte prenas la anglalingvan '*billion*' (esperante: miliardo = unu + 9 nuloj) kaj skribas '*billion*' aŭ '*biliono*' kio estas ja 1 000 000 000 000 ( $10^{12}$  = unu + 12 nuloj). Tiel neŭtrala Esperanto povas utili kiel **normiga** ponto en lingvaj miskomprenoj.

## Spertoj de la vivo

### Miraklo?

En klasoĉambro ni komencis skrib-ekzamenon, tre malfacilan. Unu el kolegoj petis ke mi kaŝe transdonu miajn respondojn. Sciante, ke tia „helpo” estas malprava, mi ne faris tion. Kiam la ekzameno finiĝis, li volis venĝi je mi kaj tiam miaj amikoj konsilis ke mi tuj informu nian instruiston pri tio. Sed mi uzis pli bonan taktikon kaj venis al li kun demando: „Kion vi atingos trompante la instruistojn? Ĉu ne estos pli bone se ni lernos kune? Se vi volas, ni povas komenci eĉ hodiaŭ.” Li pensis iomete kaj konsentis. Post kelka tempo tiu kolego montriĝis tre diligenta lernanto. Ĉiuj diris, ke mi faris miraklon. Sed mi scias, ke tion kaŭzis la sincera bonvolo. (E.. – Kamerunio, Afriko)